
# NIA  PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"


**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**


**APRILO/JUNIO 2018** **Nro. 115 (2/18)**


## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 18 de mayo, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior (26/05/2017).
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2017.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2018.
4. Renovación de la Junta Directiva.
5. Informaciones varias.
6. Ruegos y preguntas.

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel vi povas hispane legi ĉi-supre, la **vendredon 18-an de majo, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la lasta kunveno (26/05/2017).
2. Same pri la spezoj de la jaro 2017.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2018.
4. Renovigo de la nuna estraro.
5. Diversaj sciigoj.
6. Proponoj kaj sugestoj.

## LOKE ...

## DAŬRIGAS LA E-KURSO ĈE NIA SIDEJO.



Danke al sindonemo de nia amiko David Redondo, daŭrigas la E-kurso kiu komencis en februaro. Al ĝi aliĝis 13 gelernantoj, kies plejparto entuziasme ĉeestas la lecionojn.
Sur la foto, David pozas meze de kelkaj gelernantoj.

## 105-a NASKIĜDATREVENO DE EDUARDO LARROUY.




La 9-an de marto, nia kara samideano Eduardo Larrouy fariĝis 105 jaraĝa. Li festis la okazon manĝante en restoracio proksima de sia hejmo, akompanata de familianoj kaj konatuloj.

La apuda bildo estis kaptita de la raporto, kiun faris la Eŭska Televido (ETB), antaŭ unu monato, pri la E-Grupo de Bilbao.

Ĉu Eduardo estas la plej veterana esperantisto en la tuta mondo?

*(Prenita el la TTT-ejo de la E-Grupo de Bilbao. 09/03/2018)*

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**20-22 jul. 2018**. 77-a kongreso de Hispana E-Federacio. Madrido. Interesa programo kaj malmultekostaj tranoktejoj.

**21 – 28 jul. 2018.** 51-a Kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) - en Madrido. Kongresa temo "La kultura heredaĵo de Esperanto". El la programo: Interkona frandvespero, instruista trejnado, E-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, ekskursoj. Post la fermo, karavana transiro al UK en Lisbono.

**28 jul-04 aŭg. 2018**. 103-a Universala kongreso en Lisbono.

**04-11 aŭg. 2018**. Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, en Badajoz. Ne nur por gejunuloj.

103a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO
LISBONO 2018 28 JULIO – 4 AŬGUSTO

**H.E.F.**

## EBLAS MENDI LA SERVOJN DE LA KONGRESOJ EN MADRIDO

Disponeblas jam formularo por mendi servojn de la kongreso. La plej grava estas la loĝado: ni disponigos ĉambrojn en universitata rezidejo, sed la nombro estas limigita, do indas rezervi sufiĉe antaŭe. La rezervojn oni prioritatigas por la restado dum 7 aŭ 8 tagoj, kaj ĝi inkludas tri manĝojn tage (krom en dimanĉo, kiam alia solvo estas antaŭvidata)

Ankaŭ eblas mendi la ekskursojn. Dimanĉe matene ni vizitos la universitatan kaj historian Alcalá de Henares, naskiĝurbo de Miguel de Cervantes. Merkrede ni organizis vizitojn al la famaj kaj proksimaj urboj Toledo kaj Segovio, ambaŭ kun granda historia graveco.

La mendilo (kiu ankaŭ inkludas la du komunajn bankedojn kaj la vojaĝon al Lisbono) troviĝas en formularo kuŝanta en la TTT-ejo de HEF, kaj elŝuteblas ankaŭ en pdf kaj doc formoj.

Por ĉiu dubo, ne hezitu skribi al la LKK.

Vi krome povas sekvi la novaĵojn en la nun kreitaj spacoj en la sociaj retoj, Facebook kaj Twitter. Abonu ilin kaj restu en kontakto kun ni.

*("Bitbulteno" de HEF. Nro. 44. Marto 2018)*

## ANTAŬENIRAS LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN BADAJOZ

Eĉ se en januaro finiĝis la unua aliĝperiodo por la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ekstremadura urbo Badaĥozo (Badajoz), plu aliĝadas esperantistaj junuloj el la tuta mondo. Jam enskribiĝis 115 homoj ĝis nun.

Organizantoj trovis novan teamon kiu zorgos pri la taga programo kaj helpos nin organizi la tutan programon. Paulína estas aktivulo el Prago kiu eĉ jam helpis la organizadon de la vespera programo de la junula programo dum UK 2016 en Nitro, kaj kiu apartenas al la teamo de la IJK 2019 en Liptovský Hrádok. Do, ŝi decidis helpi la hispanianojn kaj samtempe pretigi sian laboron por la venontjara renkontiĝo.

La partoprenontoj povos aŭskulti prelegojn pri psikologio, internaciaj rilatoj, vojaĝoj… aŭ partopreni dancokursojn, viziti la urbon, lerni novan lingvojn… eĉ ludi batalon per akvoglobetoj! La nokto ne estos malpli mojosa. Ni organizos koncertojn de Esperanta muziko (kaj ludos loka grupo en la hispana) sed ankaŭ teatraĵon, karaokeon kaj filmon. Sen forgesi ke la ĉiam okazanta gufujo de la IJK aŭ la posta festumado ankaŭ okazos.
Ne hezitu! Partoprenu, kaj, se vi estas juna, vi ankaŭ povas kunlabori en la organizado.

*("Bitbulteno" de HEF. Nro. 44. Marto 2018)*

## NOVA RENKONTO EN MADRIDO EN JULIO

Alia internacia esperantista renkonto okazos en Hispanio en somero: temas pri la tendaro organizata de la Verdaj Skoltoj. Ĝi okazos ekde sabato la 28-an de julio ĝis sabato la 4-an de aŭgusto, en Los Molinos, proksime al Madrido, en tre komforta loko.

La datoj estas elektitaj tiel ke junuloj povos poste viziti la Internacian Junularan Kongreson, kiu komenciĝos en Badajoz ĝuste ekde la 4-a de aŭgusto. Pliaj detaloj ĉe: www.verdajskoltoj.net.

*("Bitbulteno" de HEF. Nro. 44. Marto 2018)*

## EŬROPA JARO PRI KULTURA HEREDAĴO

La Ministerio pri Kulturo de Hispanio havigis al Hispana Esperanto-Federacio la rajton utiligi la emblemon de la Eŭropa Jaro pri Kultura Heredaĵo 2018, por la kongreso de ILEI, kaj por la universitata simpozio okazonta en la lastaj du tagoj, akorde kun la ĉeftemo de ambaŭ eventoj: "La Kultura Heredaĵo de Esperanto"

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 45. Aprilo 2018)*

## NI EKPRETIĜAS POR KONGRESO EN 2019

En marto vojaĝis al Malago du reprezentantoj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), Rodica Todor kaj Vito Tornillo, por studi la kondiĉojn por organizi la kongreson de la asocio en tiu urbo de Hispanio en la jaro 2019.

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio nun studas profiti tiun okazon por organizi en Malago la Hispanan Kongreson de Esperanto, parte koincide kun la kongreso de IFEF, laŭ la modelo de kombino de tiu ĉi jaro 2018.

Tamen, la decido ne estas prenita ĝis nun, kaj do ni atendas aliajn eblajn kandidatiĝojn de aliaj urboj, kiel sidejo de la Hispana Kongreso. La decidon ni prenos komence de majo, por informi pri la decido en la Ĝenerala Kunveno de majo.

Do, la estraro decidas alvoki la lokajn grupojn kaj aktivulojn prezenti sian kandidatiĝon por la okazigo de la Kongreso. Memoru ke vi havas je via dispono la Kongresan Regularon aprobitan en 2012, kiun ni volonte sendos al interesiĝantoj.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 45. Aprilo 2018)*

## LIDJA ZAMENHOF EN "DIARIO DE TERUEL"



1 de 1

**Blanca Villarroya**
Representante de Podemos en la Coordinadora de Organizaciones Feministas de Teruel

Lidia Zamenhof, activa promotora del Esperanto

Serie de artículos de la Coordinadora de Organizaciones Feministas de Teruel, dedicados a mujeres, que marcaron un hito en sus ámbitos de actividad. Queremos otorgar visibilidad al papel de la mujer a lo largo de la historia.

Lidia Zamenhof (1904-1942) difundió el Esperanto, la lengua internacional, y contribuyó decisivamente a difundir las ideas pacifistas y feministas dentro del colectivo esperantista.

La hija menor del creador del Esperanto (el oftalmólogo polaco Ludwik Zamenhof), aprendió el idioma a los 9 años. Desde muy joven comprendió la utilidad de la lengua internacional inventada por su padre como vehículo para crear una ideología de fraternidad universal, de unidad entre todos los habitantes del planeta. Muchos esperantistas denominan a esa ideología "homaranismo", una especie de religión en la cual no se adora a los dioses sino a las personas, a toda la humanidad.

En 1925 se convirtió a la fe bahai, una religión humanista surgida en Persia. Lidia Zamenhof fue la traductora de los textos de esta religión al Esperanto. Como traductora y profesora de la lengua internacional, su labor fue incansable. A ella le debemos la traducción de obras como *Quo Vadis*.

En 1937 se estableció en Estados Unidos, país que tuvo que abandonar al año siguiente porque su actividad, la enseñanza del Esperanto, era una actividad "ilegal" en ese país. Esta expulsión fue su sentencia de muerte: tuvo que volver a Polonia, país que muy pronto fue conquistado por el ejército nazi, no precisamente muy partidario de las ideas humanistas. Lidia fue internada con toda su familia en el Gueto de Varsovia. Poco tiempo después murió en campo de exterminio de Treblinka. Toda la familia Zamenhof fue exterminada por los nazis.

La 30-an de marto, ene de sia serio pri elstaraj virinoj kiuj lasis sian spuron en la historio, la ĵurnalo Diario de Teruel publikigis artikolon pri Lidja Zamenhof, verkitan de Blanca Villarroya.

Ĝi montras la eksterordinaran personecon de pioniro kun propraj meritoj, pereinta tre tragike.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 45. Aprilo 2018)*

## TRA LA MONDO …

# Ĉu esperantistoj bezonas propran valuton?

Esperanto estas internacia lingvo, sed ĉu ni bezonas internacian valuton? Ĉe ĉiu kongreso, homoj venas el malsamaj landoj por uzi komunan lingvon, sed ĉu ili ankaŭ povus uzi komunan valuton? Nuntempe estas granda kresko de ciferecaj monoj kiel bitmono, kaj tiu pensigis min. Imagu se nia komunumo havus valuton.




Fakte la internacieco de Esperantujo malfaciligas la uzon de nacia valuto. Ekzemple, ĉe la Universala Kongreso, venas homoj el 60-70 landoj kun multegaj malsamaj valutoj. Ĉiuj perdas monon pro la monŝanĝaj kotizoj, do se estus internacia valuto, ĉiuj ŝparus monon. La revuo *Esperanto* fanfaronas ke ĝi havas abonantojn en 120 landoj, sed tio signifas multajn valutojn. *Kontakto* listigas sian prezon en 15 valutoj.

Ekzistas longa historio de multaj provoj krei valuton por Esperantujo. En 1907, oni kreis "Spesmilon", kiu strebis esti internacia banksistemo, sed ĝi malaperis post la unua mondmilito. Inter 1947 kaj 1993 ekzistis la "Stelo", kiu strebis esti internacia valuto kaj solvi la problemojn kiujn mi jam menciis. Oni volis havi komunan monon por pagi por revuoj kaj kongresoj.

UEA preskaŭ jam havas sian propran bank-sistemon, la UEA-kontojn, sed ĝi estas pra-sistemo. Mi povas sendi monon al iu alia membro de UEA kaj pagi por kongresoj per la kontoj. Sed la sistemo estas tre antikva kaj malrapida. Por sendi monon, mi devas sendi retmesaĝon al la financisto de UEA, kiu eble post kelkaj tagoj sendos la monon. Eĉ por kontroli kiom da mono estas en la konto oni devas sendi retmesaĝon kaj atendi kelkajn tagojn. Imagu se oni plibonigus la UEA-kontojn, tiel ke oni povu rapide sendi kaj ricevi monon per sia poŝtelefono?

Jam ekzistas ĉirkaŭ 1.500 ciferecaj valutoj (kaj tiu ĉi nombro rapide kreskas). Unu jam havas esperantan nomon. Monero uzas esperantan vorton por sia nomo kaj por aliaj partoj, ekzemple monujo. Sed 99% el ĝiaj uzantoj ne scias aŭ eĉ ne konas Esperanton, do la nomo estas la sola konekto. Ĉu indas aliĝi al jam ekzistanta valuto kaj konverti ĝin al Esperanta mono? Mi ne konsentas, ĉar la plejparto el la homoj kiuj aĉetas ciferecan monon nur revas pri riĉeco, ili prifajfas la valuton.

Mi ne volas krei valuton nur por riĉiĝi, mi volas krei ion, kio vere utilas al la komunumo. Estas kelkaj kernaj problemoj kun bitmono kaj aliaj ciferecaj monoj kiuj malebligas ilin kiel veran valuton. Unue, ili estas ege malstabilaj, kaj la prezo multe fluktuadas. La valutoj estas malstabilaj ĉar ili estas malcentraj, neniu regas la sistemon. Ne estas iu centra banko por protekti aŭ gvidi ilin, anstataŭe ili svingiĝas kun la vento.

Ĉar la kvanto de mono estas fiksita, la valuto estas deflacia, kaj ju pli multe da homoj aliĝas, des pli alta iĝas la prezo. Sed se la prezo daŭre plialtiĝas, ne estas instigo elspezi la valuton, fakte estas puno kontraŭ elspezo. Se mi elspezas la monon kiam la prezo estas 5, sed poste ĝi altiĝos al 10, mi sentas min stultulo, ĉar mi maltrafis la ŝancon duobligi mian monon. Sed se homoj ĉiam atendas plialtiĝon de la valuto, ili neniam elspezas ĝin. Se ĉiuj nur tenas la valuton, atendante altiĝon, tio malstabiligas la valuton.

Por eviti tiujn problemojn, mi proponas ke nia valuto havu centran bankon, preferinde UEA kaj/aŭ TEJO. Por eviti spekuladon, preferindas ke la prezo estu nemovebla aŭ almenaŭ tre rigida, verŝajne ligita al iu granda valuto kiel la eŭro aŭ dolaro. La centra banko povus facile krei pli da moneroj por pligrandigi la kvanton de mono laŭ la bezonoj de la valuto. Se la prezo estas tro alta, ili vendus pli por malaltigi la prezon kaj certigi ke la valuto estu stabila.

Mi volus ke la valuto estu tute neprispekuladebla. Se iu profitus per aĉetado kaj vendado de la valuto, tio estus eraro. La celo de la valuto estas uzo kaj utileco, ne spekulado kaj alta prezo. Estu nur unu oficiala vendejo de la valuto (eble la retejo de UEA aŭ TEJO), kaj ni povus eĉ malebligi la vendadon de ĝi.

Se oni aĉetu, oni devu elspezi en Esperantujo aŭ sendi al aliaj esperantistoj. Tio povus esti enspezo por UEA kaj TEJO, kiuj certe bezonas financan helpon. Ĉi tio ankaŭ evitigus la alian grandan problemon de ĉifromonoj: ŝteladon kaj trompon.

Do mia ideo estas ke homoj povu ŝanĝi nacian valuton al la "Nova Stelo" ĉe la retejo de UEA aŭ TEJO. Per ĉi tiu mono, oni povus pagi kotizon al iu kongreso, abonon al revuo, aĉeti libron aŭ muzikon kaj tiel plu. En la kongreso oni povus aĉeti bieron aŭ ion alian en la vendejoj. Tial preferindas ke estu iu poŝtelefona apo por facile sendi la monon. Aŭ eble se mi simple dirus mian kodon (kiel la UEA-konto), la vendisto povus aŭtomate elpreni la monon el mia konto (kompreneble estus kontroloj por konfirmi tiujn elprenojn).

Bedaŭrinde mi scias tute nenion pri programado aŭ la teknikaĵoj de ciferecaj valutoj. Mi petas ke programistoj kontaktu min por diskuti la eblecon de mia ideo. Kiuj estas eblaj problemoj, kostoj, teknikaĵoj? Mi volis nur doni kelkajn proponojn el financa kaj ekonomia vidpunktoj. Ĉu ĉi tiu estas bona ideo? Ĉu indas krei nian propran valuton? Ĉu mi proponis bonan sistemon por la valuto? Eble ĉi tiuj estas frenezaj neatingeblaj ideoj, sed ĉiuj novaj inventoj unue nur estis frenezaj ideoj, ĉu ne?

*( Resumo de artikolo de Robert Nielsen. La tuton eblas legi en "Libera Folio". 03/03/2018)*

## ARABLINGVA RETEJO.

Danke al la laboro de Emilio Cid, estrarano pri informado de UEA, kaj al la laboro de juna siria esperantisto, Taled Orabi, ni, la komisiono de UEA pri agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko, disponas pri la arablingva versio de la paĝaro www.esperanto.net: http://esperanto.net/ar/

Vi povas kompreni la grandan antaŭensalton rilate al nia kutima paĝareto. Dankon, UEA!

*(Renato Corsetti. 07/03/2018)*

# ĈINA EDUKA MINISTERIO AKCEPTAS ESPERANTON KIEL BAKALAŬRAN EDUKADON

Estas grava novaĵo, ke la ĉina eduka ministerio akceptas Esperanton kiel bakalaŭran edukadon por 4 jaroj. Tio signifas, ke post kvarjara studado de Esperanto la studentoj havos kvalitifikon peti ŝtat-oficistan kandidatiĝon same kiel aliaj diplomitoj el la ĉina universitato.

Jes, antaŭ iom da jaroj jam okazis edukado de 11 diplomitoj en ĉina komunika universitato, tamen tiu studado servis nur por EPĈ kaj Ĉina Radio Internacia (ĈIR), kaj ĝi havas esencan diferencon kun ĉifoja permeso de la ĉina eduka ministerio, ĉar ĉifoje bakalaŭra edukado estas laŭ merkata regulo pli vaste serva al la tuta socio.

Antaŭ la oficiala peticio al la ĉina eduka ministerio estrinoj BA Yan kaj HAN Jianxia de Universitato Zaozhuang multfoje diskutis kun mi (IKEF), ĉu vere ekzistas merkata bezono de esperantigitaj studentoj aŭ ne? - ĉar EPĈ kaj ĈIR bezonos nur kelkajn diplomitojn! Mi informas pri IKEF ke ja ekzistas merkata bezono, kvankam ne granda. Mi respondis, ke se la klaso havos kelkdek studentojn, la diplomitoj povos trovi sian laboron. Por kuraĝigi ilian peticion mi proponis ke la studentoj povos staĝe praktiki en esperantistaj kompanioj en diversaj landoj, eĉ nia IKEF helpos ilian laborigon krom kelkaj en EPĈ kaj ĈIR.

Tamen ni devas scii, ke tio estas nur naskiĝo, kaj tia edukado ekzistas ankoraŭ dependonta al aplika aktivado de IKEF kaj aliaj fakaj Esperanto-organoj, ĉar la universitato ne volas subteni tian edukadon nur por kelkaj dungotoj ĉe EPĈ kaj ĈIR! Fakte, Ĉinio estas merkatisma lando pli ol kapitalisma lando. Ĉiu ekzisto dependas de la merkata bezono, ankaŭ Esperanto.

*(Mesaĝo de s-ro Chielismo Wang Tianyi, Tianyi Wang, Prezidanto de IKEF)*

*(Ret-Info / Lingvo-Studio, LS. 29/03/2018)*

# BICIKLA KARAVANO AL LISBONO.

En la somero de 2018 kelkaj esperantistoj biciklos tra Eŭropo por atingi la mondajn kongresojn UK en Portugalujo kaj IJK en Hispanujo.

Ni tre ĝojus se vi biciklos kun ni, ĉu nur ĝis la rando de via urbo, ĉu duonan tagon, ĉu tutan tagon, ĉu plurajn tagojn, ĉu la tutan distancon ĝis la celo, vi estos **bonvena**.

Ni faros detalan planon pri tio, kiujn lokojn ni vizitos en kiuj tagoj. Tiu plano dependas de tio, kien ni ricevos invitojn. Tial la elirpunkto estas skizo de nia itinero de **Berlino** ĝis **Lisbono**, kaj koridoro tra kiu ni planu la vojon, kun markoj indikantaj, kiam ni devus esti en kiu parto de la koridoro por atingi la celon ĝustatempe.

Se vi estas en la koridoro, ne hezitu inviti nin. Skribu al christine.duisburg@gmx.de La **limdato** ĝis kiu ni kolektos invitojn estos la **15-a de majo 2018**. Post tiu dato ni ellaboros definitivan planon kaj informos vin. Ankaŭ se vin interesas kunbicikli dum kia ajn distanco, skribu al christine.duisburg@gmx.de

Por priparoli la agadon, vi povas uzi nian retpoŝtliston, aŭ nian paĝon en facebook. Por aliĝi al la retpoŝtlisto, sendu malplenan mesaĝon el via retpoŝtadreso al la adreso vokovo+subscribe@googlegroups.com. Vi ne devas havi google-konton por tio.

Vekiĝu kaj Verdiĝu! http://bemi.tejo.org/vokovo/

*(Christine Brücker <christine.duisburg@gmx.de>. 15/04/2018)*

# EVOLUO DE LA MEMBRARO DE UEA.

Okaze de pasko mi ne povas transdoni bonajn novaĵon. Ankaŭ en 2018 la membroevoluo bedaŭrinde postrestas la esperojn. Jen la aktualaj informoj pri la ĉefaj kategorioj surbaze de membriĝoj ĝis 01-04-2018:

MA/MA-J: 969 membroj. samtage 2017: 986 membroj
fina rezulto 2017: 1330 membroj. momenta **minuso** = -17 membroj
---------------------------------------------
MJ-MJ-T: 1353 membroj. samtage 2017: 1203 membroj
fina rezulto 2017: 1757 membroj. momenta **pluso** = 150 membroj
--------------------------------------------
MG: 320 membroj. samtage 2017: 292
fina rezulto 2017: 468 membroj  momenta **pluso** = 28 membroj
-------------------------------------------

En la ĉefaj membrokategorioj do estas eta pluso (161 membroj), SED 218 personoj el la membraro aliĝis pere de Fondaĵo Canuto (antaŭa jaro 116 membroj je 01-04-2018). La pluso ĉe jarkotizantoj, do momente estas nur +59 membroj.

Financoj pro membroevoluo: Momente la membroevoluo ne estas kontentiga. Por la buĝeto oni kalkulis kun pli da membroj ol nun estas, do rimedoj estos malpli altaj ol prognozitaj (se ne okazas ŝanĝo de evoluo dum la resto de la jaro). Se oni faras prognozon laŭ la nunaj ciferoj, fine de la jaro povus manki enspezoj en alto de ĉ. 8.000 - 10.000 EUR kompare kun la buĝeto.

Laŭlanda evoluo (mi nur mencias la ĉefajn evoluojn):

Malpli da membroj ol en la lasta jaro (La ciferojn montras la diferencon inter nuna membraro de koncerna lando (01-04-2018) kun la fina rezulto de 2017 (31-12-2017).

3 landoj kun plej alta minuso: Koreio (-151), Japanio (-46), Ĉinio  (-40)

3 landoj kun plej alta pluso: Meksiko (+26), Litovio (+13), Pollando (+12)


*(Martin Schäffer, Ĝenerala Direktoro de UEA. 02/04/2018)*

# MALNOVAJ FILMOJ EN ESPERANTO.

Hazarde, mi malkovris tiun ĉi kanalon; mi pensas ke estas bona agado:

https://www.youtube.com/channel/UCRupmZuBFvp5yRc-nWQeXZg

*(Pablo Busto. 27/03/2018)*




Ne forgesu viziti, de tempo al tempo, la TTT-ejon de la E-Grupo de Bilbao. Daŭre vi trovos informojn pri nia urbo kaj pri la agado de nia rondo.

*https://sites.google.com/site/esperantobi/home*